Pri arboj

Vespere mi dum raportado de eventoj en televido neprecize aŭskultis ion pri propono faligi arbojn, starantaj ĉe vojoj, ĉar ili kaŭzas multajn averiojn de aŭtomobiloj, kiuj kolizas pro ekfrapo al arboj. Tia aranĝo ĉesigus domaĝojn de posedaĵoj kaj vivoj. Sed ni vespermanĝis kaj pluraj eventoj estis same maltrankviligaj, kaj laŭ mia sukcesa maniero laŭ rekomendo sur afiŝo en mia laborejo en malsanulejo kontraŭ anima forbrulo: *„Problemo, kiam aperus, mi solvas ĝin tuj, se mi ne povas solvi ĝin, ne temas pri problemo, sed pri sensencaĵo"*, mi lokigis la informon ien flanken en mian cerbon.

Post kelkaj horoj mi enlitiĝis. kaj ekdormis.

De tempo al tempo mi sonĝas. Tiu ĉi sonĝo estis nekredeble klara kaj mi memoris ĝin pos la vekiĝo. Mi estis fruktarbo en aleo. La arboj kunvenis kaj diskutis pri faligo. Mi laŭte parolis. Komune ni prilaboradis kontraŭproponon: forigon de aŭtomobiloj, ĉar ili movas kaj povas eviti nin kaj ni tiun eblon ne havas, krome ni prizorgas ekvilibron en la naturo, kontraŭ aŭtomobiloj, kiuj la naturon damaĝas. Pli klare ol Suno estis, kaj nur stultulo dirus malon, ke mankas demokratio.

Mi vekis je la kvara horo kaj la sonĝon priskribis. Nu, legu! Io estas grava pri arboj….